



LA FERVOJISTO

Oficiala organo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj
Monata fakrevuo pri fervojo.

Redaktoro: ILIJA PUHALO, fervojoficisto, Jezuitska ulica 1. Zagreb, Jugoslavio

Jaro II.

Junio-Julio 1925.

Nro. 9—10.

RAPIDEGAS LA TEMPO!

Kun terura rapideco paŝegas la tempo.
Ni preskaŭ ne povas sekvi ĝin.

Ŝajnas, ke nur antaŭ kelkaj tagoj estis efektiva nia elekto okaze de Viena kongreso, kaj jam tre proksime estas la tempo, kiam nia eslaro devas raportti al niaj anoj, kion ni faris dum la pasinta asocia jaro.

Nia flanko ni tre ĝojas, ke ni povos raportti, ke nia asocio kvazaŭ post malsana dormego, ekkomencis vekigi. La intereso pri ĝi trairis jam la limojn de nia kontinento.

La universala progreso de Esperanto ekmovigis preskaŭ ĉiulandajn fervojistojn de nia kontinento, kaj mi reveme jam antaŭvidas en tre proksima estonteco, ke nia asocio fariĝos grandega internacia organizo.

Estas konata fakto, ke la fervojoj estas tre gravaj rimedoj de tutmonda trafiko. Ĉiu fervojisto estas grava ero de tiu ĉi internacia organizo. Ni estas kunligitaj ne nur per samspeca fera vojo, sed ankaŭ per preskaŭ samaj ŝtataj leĝoj, samaj regularoj kaj per samaj celoj. Sekve de tio, ĉiulandaj fervojistoj jam laŭsence faras veran internacian asocion, ne konsiderante tion, al kiu parto de la terglobo ili apartenas.

Estas mirinda afero, ke Esperanto, jam en sia komenco ne kunigis la fervojistaron en komunan fakan rondon internacian, kiun ili nur pro diverslingveco ne povis atingi.

La nunjaraj sukcesoj de Esperanto espereble disbatos ankaŭ la lastajn barojn!

Sed por plena sukceso de nia asocio ne estas nur necese, ke ni ekvekiĝu, ke ni ekkriu feliĉan bonvenon al la progreso de nia asocio, kaj poste atendu, ke bakitaj alaŭdoj enflugu en niajn buŝojn!

La progreso de nia asocio bezonas eĉ trege bezonas seriozajn kaj diligentajn kunlaborantojn.

La mankon de tiuj ni ĉiuj jam sentas.

Mi ne kredas, ke la fervojistaro estas sen fiaj homoj.

Do antaŭen!

Antaŭen, al certa sukceso!

St. V. Stojniĉ.

INTERTEMPO DE LA TRAJNOJ.

Okazis antaŭ kelkaj monatoj, ĉe la itala fervoja administracio la ŝanĝigo de regularo pri la intertempo de la trajnoj trairantaj la saman direkton. Antaŭ la mondmilito la regularo de la trajnoj estis tia ke 10 minutoj post la foriro de unu trajno de la stacidomo A, alia trajno foriris de tiu stacidomo en sama direkto, tio estas sur la sama linio.

Kompreneble la danĝero ne estis facile evitebla, se la unua trajno haltis antaŭ aliro dumnokte sur la kurbaj vojoj de mallonga radiuso kaj deklivaj, dumvintre kiam densa nebulo malpermesas al la maŝinisto kaj trajneŝoforo vidi la multenombrajn trairantajn trajnojn la fervoja direkto decidis rimedon por helpi la regulan funkciadon dum tiu tempo kiam la fervojoj atingis, la plej grandan gravecon. Oni postulis ke la staciestro povas ordoni la foriron de la dua trajno nur kiam li scias, pere de telegrafkorespondo, ke la unua estis atinginta la proksiman stacidomon.

Ĉi tiu sistemo estis vere laŭdinda kaj preferebla ĉar per ĝia praktika aplikado oni evitis danĝerojn.

Post la milito oni uzadis ĝin kutime kaj nun ĝi estas sankciata.

Ĉi tiu sistemo garantias la trajniradon tiel, ke ĉiu trajno havas ĉiam antaŭ si la vojon libera.

Estas laŭdinda afero ke oni klopodos plibonigi kaj pliperfektigi la deĵorsistemojn.

La itala fervojistaro estas dankema al la fervoja administracio por tio kaj esperas ĉiam ke oni klopodos sukcesigi la uzadon de pliperfektaj iloj. Mi pritraktis ĉi tiun aferon ĉar mi deziras ke aliaj samfakanoj bonvolu ĝin pritrakti, ĉar mi deziras scii kiamaniere oni reguligas la iradon rilate al la intertempo de du aŭ pliaj trajnoj kiuj iras sur la sama linio laŭ la sama direkto.

Toni Umberto,
Mantova — Italio.

LA II-a KONGRESO DE ESTONIAJ FERVOJISTOJ.

La kongreso okazis en Tallinn la 25, 26 kaj 27 de marto ĉi-jare.

La kongreson partoprenis 63 delegitojn de 9 profesiaj unuigoj kaj krom ili partoprenis la kunsidojn la fervojdirektoro sinjoro Reinok, Trafikdirek-

foro sinjoro Reimann (ano de IAEF) kaj aliaj ĉefoj de la fervoja administracio.

Al la prezidanto de la kongreso oni elektis s-ron Melenčuk, al la ĉefsekretario s-ron Michelson kaj al la helpsekretario s-ron Sonno, kiuj estas el esperantistaj rondoj kaj anoj de IAEF.

La kongreson salutis je la nomo de IAEF nia landa asesoro s-ro A. Pung, kiu ankaŭ transdonis al la kongreso salutleteron de Internacia Transportlaborista Federacio.

La plej gravaj demandoj estis pri salajroj, laborkondiĉo, loĝejo, libertempo, interrilatado kun alilandaj fervojistoj per Esperanto, vestaĵo, higieno, prava ekzistado de ŝtalfocistoj kaj multaj aliaj.

La kongreso postulas pliatigon de la salajroj ĝis la vivnivelo, kiu egalas proksimume al 7500 Emk. Pli malpli de tiu sumo jam neniu estu salajrata. Nuntempe la plej malalta salajro estas 3700.— Emk. per kiu sumo neniu povas vivi.

Labortempo ĉe korpaj laboroj estas fiksita normala, t. e. 8-hora, sed ĉe psika laboro estas 7-hora. La kongreso postulas restarigon ankaŭ ĉe la psika laboro normalan labortempon, t. e. 6-horan. Por trajn kaj lokomotivbrigadoj devas labortempo esti monate 204-hora anstataŭ nuna 240-hora.

Ĉar la luopago estas tro alta, precipe en Tallinn, kaj per la nunaj salajroj oni neniel povas luigi decajn loĝejojn, postulas la kongreso por tio elpagon de speciala luopago je 25% de la salajro.

Maljunaj fervojistoj estas pensiitaj laŭ la leĝo je maljuneco post 60-jara aĝo kaj 25-jara servado. La templimo de la aĝo estas kompare tro alta en nuntempaj cirkonstancoj kaj la kongreso esprimas la deziron, ke la aĝo estu malaltigita ĝis 55 jaroj. En unuopaj ŝtatoj de Eŭropo estas eĉ 65-jara templimo, sed ĉiuj pli liberemaj ŝtatoj jam malaltigas la templimon ĝis 55 jaroj.

El aliaj demandoj estas por la tutmonda gefervojistaro plej interesa kaj plej grava tamen demando pri interrilatado kun alilandaj fervojistoj per Esperanto.

La subskribinto de tiu-ĉi artikolo, kiel prezidanto de EFEG kaj asesoro de IAEF mullege interkorespondadis kun alilandaj fervojistoj kaj el siaj propraj spertoj povas konstati, ke ĉe bona volo oni povas tre utile jam eluzi la servojn de Esperanto por fakaj kaj oficaj aferoj. Tion pruvas interalie ankaŭ la aliĝo de Estoniaj fervojistoj al Internacia Transportlaborista Federacio, kun kiu la tuta antaŭa korespondado pri aliĝo estis farita nur en Esperanto.

Ĉar la demando pri la internacia interrilatado de la tutmonda gefervojistaro estas tre grava kaj la neceseco de la internacia lingvo Esperanto ĉe tio estas evidenta, estis ankaŭ la demando pri tio prenita en la tagordon de la kongreso. Post la referado pri tiu ĉi temo de la subskribinto, la kongreso akceptis jenan de li proponitan rezolucion:

»Konsiderante la urĝan neceson interrilatadi kun alilandaj fervojistoj kaj kun iliaj organizaĵoj.

Konsiderante la gravan efikon de la interrilatado al la gefervojista privata vivo kiel ankaŭ al ilia servado.

Decidas la tutlanda kongreso de estoniaj fervojistoj:

1. Evoluigi diversflanke la interrilatadon kun alilandaj fervojistoj kaj iliaj organizaĵoj,

2. Disvastigi ĉe la interrilatado tre necesan internacian lingvon esperanton inter la gefervojistaro kaj rekomendi al ili ellerni la lingvon,

3. Proponi al la fervoja administracio, ke dum aranĝotaj kursoj por la oficistoj, kiuj servas trajnojn kaj interrilatas kun publiko, estu ankaŭ esperanto prenata en la programon.

Pri aliĝo al Internacia Transportlaborista Federacio la kongreso akceptis jenan rezolucion:

Konsiderante la gravan influon de la internacia organizo de fervojistaj profesiaj unuigoj al plibonigo de iliaj laborkondiĉoj kaj ilia ĝenerala situacio,

Decidas la tutlanda kongreso de estoniaj fervojistoj:

1. Aliĝi al internacia transportlaborista federacio,

2. Saluti la tutmondan gefervojistaron pere de internacia transportlaborista federacio kaj esprimi al ili simpatian je batalado pro sia prava ekzistado,

3. Sendi laŭpove reprezentanton al la tutmonda gefervojista kongreso en Bellinzona la 30. VI.—2. VII. ĉ. j. . . .»

Samideanoj el ĉiuj landoj, decidu same.

Se ni estos per Esperanto poste organizitaj jam dece, la influo de la tutmonda gefervojistaro al la mondaj aferoj estas evidenta. Fervojistoj el unu lando ne volas militi kun fervojistoj el aliaj landoj kaj ne estos plu milito. Ili laboros kune kaj akordigos siajn laborojn kaj vivkondiĉojn kaj per tio helpos al la ekrego de vera paco.

Ideo, esprimita de la unua esperantisto kaj ĉiam ripetata de la tutmonda geesperantistaro, pri unu granda rondo familia de la homaro kiel ankaŭ ideo pri unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo jam ŝvebas en kapoj ankaŭ de multaj aliaj pensemoj kaj politikistoj.

Nie plie kuraĝigu kaj subtenu ilin.

A. Pung, Talinn,
asesoro por Estonio.

DEMANDOJ KAJ PROPONOJ.

Mi pensas kaj esperas ke dum la 17. en Geneve oni aranĝos ankaŭ la fervojan fakksindakon kaj certe oni klopodos kontentigi la partoprenantojn. Mi pensas ankaŭ ke oni povos praktikigi la ĝis nun interŝanĝitajn pensojn kaj fakvortojn.

Pro tio mi proponas, ke oni aranĝu viziton al la Geneve-a stacidomo ĉe kiu la partoprenantoj povos viziti la deĵorfunkciadon, demandi kaj interŝanĝi pensojn pri ĉio kio rilatas la fervojajn fakaferojn.

Por tion fari estas necese ke iu bonvolema samfakano, kiu konas la svisan deĵorsistemon, prenu sur sin la taskon aranĝi la promenadon kaj la viziton de la stacidomo. Tia vizito de fervojistoj el diversaj nacioj kaj malsimilaj fervojaj administracioj libere kaj paceme kunigitaj per la sama lingvo estas certe tre taŭga. Ĝi taŭgos al ni ĉar per ĝi la vizitantoj povos uzi la proponatajn fakaferojn.

Tiu agado signifos ankaŭ dankesprimon al la senlaca kunlaborantoj kiuj senĉese pliriĝigas nian fakvortaron ĉar ĝi estas unu el la plej laŭdindaj kaj necesaj aferoj. Plie ĉiu fremdulo povos sperti pri traktante la interesindajn novaĵojn.

Alia grandegan utilon igas al la fervoja esperantistaro ĉi tiu vizito, ĉar tiamaniere oni povas pruvi al la nekredemuloj ke nia lingvo kunigas ĉiujn kaj precipe la fervojistojn.

Oni povas pensi ke la tutmonda fervojistaro estas jam kunigita. Fakte ekzistas multaj internaciaj traktatoj pri intersango de ruliĝa materialo (varvagonoj kaj veturiloj), pri la horaroj de rapid trajnoj trakurantaj malsimilajn landojn, horaroj pri intersango de telegraf korespondado, pri la enspezoj de vartransportado k. t. p., k. t. p.

Do, ni devas kompletigi la internaciajn rilatojn aldonante la internacian ligvon. Pere de Esperanto la tutmonda fervojistaro plibonigas kaj plibonigos ĉiujn branĉojn ĉar la intersango de pensoj kaj proponoj sukcesigos disvastiĝi la elpensadojn. Kompreneble la vizitanto rimarkos la malsimilaĵojn inter la fremda sistemo kaj tiu, kiun li konas kaj li kutime uzas ĉe sia administracio kaj pere de tiu komparo li juĝas. Certe la juĝo instigas praktike uzi la preferindajn ilojn kaj deĵorsistemojn aŭ eĉ fari proponojn ĉe sia estraro.

Reparolante pri fakvortoj mi diras ke oni facile komprenas ilian taŭgecon kaj necescon. Sed unu el la ĉefaj aferoj konsistas el tio, ke uzado de fakvortoj postulas precizan signifon. Por atingi la celon estas laŭdinda sistemo klarigi la neologismojn kiom plej eble. Do, krom la kutimaj klarigoj estas preferindaj ankaŭ ekzemploj pri la praktika aplikado de la vortoj.

Unu el la preferablaj sistemoj estas la »Rimarko« kiun oni legas en No 2 de »La Fervojisto« en dua paĝo (sube). Tie oni montras kia maniere la neologismoj estas (aŭ povas esti), uzataj praktike.

Alia preferinda sistemo estas la jena: Se eble oni devus fari skizojn aŭ desegnojn aŭ eĉ bildojn por pli faciligi la ĝustan interpretadon.

Pri la uzado de neologismoj oni legas en No 2 de nia revuo ke la elpensinto akceptas kritikojn aŭ kontraŭajn proponojn kaj tio estas vere laŭdinda ĝentileco. Sed se neniu faras proponojn pri anstataŭo de vortoj aŭ pri ŝanĝigo de vortradikoj dum limigota tempo la neologismoj estos oficialigataj ĉar silento signifas favoran konsenton. Plie, oni povas imagi ankaŭ ke la elpensinto klopodas eĉ penedas por eltrovi la plej taŭgajn kaj disvastigitajn radikojn laŭ la fundamento.

Toni Umberto,
Vicolo Cappelo 5
M a n t o v a. Italio.

GERMANA TRAFIKEKSPozICIO EN MÜNCHEN.

Junio—Oktobro 1925.

La 1. de Junio estas solene malfermita la germana trafikekspozicio.

Ĝi estas unu el la plej grandaj, plej ampleksaj iam okazintaj ekspozicioj pri ĉiuspeca trafiko ne nur en Germanujo, sed en la tuta mondo. La ekspozicia tereno kovras preskaŭ 300.000 kvadrmetrojn. El tio oni povas iom imagi la gigantan amplekson kaj riĉan enhavon de la ekspozicio. La ekspozicio dividiĝas je ĉi — sekvontaj ĉefgrupoj: Surtera — akva — kaj aertrafiko, Poŝto, Telegrafio, Telefono, Radio.

Surtera trafiko: Sekcio I. Fervojoj; Sekcio II. ŝtrata trafiko.

Akva trafiko: Sekcio I. Interna trafiko; Sekcio II. mara trafiko.

Aera trafiko: Aerveturiloj ĉiuspecaj kun ekipaĵoj, funkciadestablaĵoj kaj sekurigiloj.

En speciala fakoj estas kolektata: Psikoteknikaj metodoj por ekzameni profesion taŭgecon, faka instruado, profesiaj kaj ŝirmvestaĵoj, reklamo kaj varbado portrafikaj, fakliteraturo, la filmo en trafikaferoj k. t. p. Dum la daŭro de la ekspozicio okazas: Fakaj kaj teknikaj kongresoj (i. a. la unuiĝo de la Europaj fervojaj administraj Paris), paroladoj pri sciencaj kaj praktikaj temoj, fine grandstila sport — kaj trafiksemajno.

Interesa specialaĵo estas: La »Lilipuffervojo«, servanta por transportado de pasaĝeroj interne de la ekspozicejo. Lokomotivo kaj aliaj veturiloj estas konstruataj trionmezure de la realeco. La fervojeto similas en konstruo, establaĵoj k. t. p. tute al granda fervojo, pro tio ĝi havas blokstaciojn, stacidomojn, pontojn, tunelon, supren- kaj mal suprenirojn k. t. p. Unu vagonaro enhavas en 10 vagonoj 160 personojn.

Ankaŭ la »Germana-Muzeo« antaŭ kelkaj semajnoj inaŭguraciita, estas interesega kaj sole postulas plurajn tagojn por nur supraĵe trovi la ejojn. Venu do, karaj gesamfakanoj, aŭ antaŭ aŭ post la XVII-a aŭ aparte al la bela ĉefurbo de Bavarujo. Vi ne nur povas grave pliigi vian fakon sciadon, vi povas ankaŭ amuzigi en la gaja, artplena urbego kaj ripozi en la valoj de la proksimegaj »Bavaraj Alpoj«.

Gekolegoj nesciantaj germane turnu sin al la ĉi-suba adreso. Aŭ mi mem gvidos aŭ mi prizorgos Esperante parolantan gvidanton.

Oskar Schlicht,

Nürnberg
Esperantosekretario
Albrecht Dürersstr. 1.
Germanujo.

PRI LA MOVADO.

Jugoslavio.

Z a g r e b. La 30-an de Aprilo 1925 estas fondita la »Klubo de Esperantistaj Fervojistoj«. — En la klubkomitato estas elektitaj:

Prezid. stro. Ivan Poženel, inspektoro;
Vicprezid. Ivan Novak, inspektoro;
Sekretario: Milan Zupančić, adjunkto;
Kasisto: Egidije Gomišček, supera kontroloro;
Bibliotekisto: Bogomir Praček, fervojoficisto;
Komitato konsistas el jenaj personoj: Ilija Puhalo, Ivan Štahan, Josip Hanj, revizoroj estas Vilibald Vičević, Franjo Trupkovič, Josip Pahoki.

Ni deziras al la nova klubo ke ĝi progresu.

M. Ž.

Japanujo.

El la nro 6. de »La Revuo Orienta«: En la Instituto por Fervojistoj de la Fervoja Ministro oni aranĝis de la 7-a de Februaro Esperantan kurson sub la gvido de ing. K. Ossaka, 13: h. 30—15. h., ĉiŝabate. Partoprenis en ĝi pli ol cent okdek studentoj de la Instituto. En la nova lerneja jaro (de Majo) nova kurso rekomenciĝos.

En sia lekcio pri fervojaj vagonoj ĉe la nomita Instituto S-ro K. Ossaka, meĥanika ing. de la Ministro, uzas Esp. terminojn.

La nomita inĝeniero verkis artikolon pri Esp. en monata revuo »Tecudo Seinen« (»Junaj Fervojistoj«); ĝi kaŭzis tre intensan intereson inter fervojistoj.

Multaj demandantaj leteroj estas alvenantaj ĉiutage. Tio montras, ke pri la lingvo sufiĉe atentis fervojista junularo.

*

Bedaurinde nia estraro malgraŭ diversaj provoj ne sukcesis ricevi interrilaton kun niaj japanaj kolegoj.

Ni petas japanajn kolegojn aŭ samideanojn, ke ili bonvolu al sro ing. K. Ossaka montri nian revuon kaj atentigi lin pri nia asocio.

Eble ni povos starigi kun li liamaniere interrilaton.

EL GAZETOJ.

En »Austria Esperantisto« nro. 6 paĝo 63 aperis jena sciigo:

General-Direkcio de la aŭstria Liglandaj fervojoj eldonis laŭ iniciato de s-ro Hugo Steiner, ĝen. sekr. de A. E.D., la jenan ofican cirkuleron: Akt-nro. 53532/25.

Koncern.: Esperanto.

Al ĉiuj direktoj de Liglandaj la Fervojoj.

Plenumante peton de Aŭstria Esperanto-Delegitaro ni oficordonas al vi, raportli al ni la nombrojn de tiuj al vi submetitaj dungitoj, kiuj

1. scipovas Esperanton,
2. nuntempe lernas tiun ĉi lingvon,
3. volas lerni tiun lingvon en aŭtuno de l' nuna jaro.

Wien, 14. VI. 1925.

La Gen.-Direktoro
d-ro Maschat.

Tiun ĉi cirkuleron ricevis ĉiuj servlokoj (oficejoj de la direkcio, stacioj, haltejoj, laborejoj por konstruo kaj riparo de lokomotivoj kaj vagonoj, hejtigejoj kaj ties laborejoj, oficejoj por prizorgo de la relaroktp.).

Grava en liu ĉi cirkulero ankaŭ estas la punkto pri raporto ĉiuokaza, ankaŭ se neniu sin anoncis.

Tiel ĉiuj estroj (ĉu amikoj de E. aŭ ne) devos plenumi tiun ĉi ordonon.

Ĉu vi scias, kara legantaro, kiom da homoj per tiu al E. favora ordono de la ĝen.-dir. ne nur estis simple atentigitaj al Esp., sed ankaŭ al la cirkonstanco, ke ilia plej supera instanco favoras ĝin?

Vi sciu, ke en la servoj de la Liglandaj fervojoj nun estas proksimume 90.000 dungitoj, el kiuj 70% estas edziĝintaj. Se oni nur kalkulas po edziĝinta fervojisto du infanojn, ni ricevas praksimume 300.000 personoj, el kiuj granda parto verŝajne per tiu ĉi cirkulero unuan fojon aŭdis ion pri E.

La tuta Aŭstria respubliko nuntempe havas 6 milionojn da enloĝantoj. Tial 5%, aŭ la dudeka parto, de la aŭstria enloĝantaro sciĝis per helpo de la ĝen.-dir. de liglandaj fervojoj pri Esperanto.

Per tiu ĉi faro la ĝeneraldirekcio de aŭst. liglandaj fervojoj meritigis sin je la plej sincera danko de la Esperantistaro.

Hugo Steiner

ĝen.-sekr. de Aŭstria Esp.-Delegitaro.

*

En hungara oficiala fervoja gazeto »Vasuti és közlekedési közlöny« nro 20 de dato 10. V. 1925 aperis en neoficiala parto artikolo verkita de nia hungara asesoro sro. Teodor Kovacs sub la titolo »Esperanto a vasut szolgálatában« (Esperanto en la fervoja ofico) kies interesan enhavon ni presigos ricevonte de la aŭtoro la esperantan tradukon.

TAGNOVAJOJ.

Tallinn. La 16 ĝis 30 marlo ĉ. j. okazis la III-a laŭvica fervojkonferenco de Sovetio-Latvio-Estonio. En la tagordo estis multaj punktoj pri trafiko, fervoja tekniko kaj ekonomiaj aferoj. Ellaboritaj estis nova regularo pri trajnado de rapide difektigitaj komercaĵoj, regularo pri teknika stato de reciproke uzataj pasaĝervagonoj kaj regularo pri trajnado de rapidaj komercaĵoj.

A. Pung.

SCIIGOJ DE LA ESTRARO.

La estraro sciigas la anojn, ke sro. Pavao Bulković, sekretario de IAEF. petis per sia letero d. d. 4. VI. 1925. eksigon el la estraro, kaŭze de malbona saneco kaj aliaj privataj aferoj, kiuj lin malhelpis plenumi la funkcion de la sekretario.

La estraro akceptis lian eksigon en sia kunsido d. d. 16. VI., kaj dankis al li por faritaj laboroj je la intereso de nia asocio.

Samtempe decidis la estraro, ke la funkcion de sekretario prenos sur sin vicprezidanto sro. Ilija Puhalo tiel longe ĝis kiam oni trovos alian taŭgan personon.

Konforme al tio estas petataj ĉiuj anoj ne plu skribi la leterojn kiuj rilatas la asocion al adreso de ekssekretario, sed nur al adresoj de prezidanto vicprezidanto aŭ kasislo.

2. Per tiu ĉi numero de nia revuo finiĝas la asocia jaro 1924/25 kaj per aŭgusta komencas la nova 1925/26 jaro.

Ĉiuj niaj anoj estas petataj atenti la novajn kotizojn, kiuj estos publikigitaj en la aŭgusta numero de nia revuo, kaj kiel eble plej frue sendi al ni kotizon por 1925/26 jaro.

3. Pro financaj kaj aliaj kaŭzoj ne estas eble al la estraro veturi en Geneve kaj tie partopreni nian jarkunvenon.

Al la jarkunveno veturas sole nia vicprezidanto sro. Ilija Puhalo.

Sciigante tion al niaj anoj, ni esperas, ke niaj anoj, kiuj ĉeestos la jarkunvenon bonvolos konsideri tiun fakton kiu malhelpas nin ĉeesti la jarkunvenon.

Ĉiuj estu konvinkitaj, ke ni ankaŭ en venonta asocia jaro dediĉos ĉiujn niajn fortojn al nia asocia progreso.

La estraro.

SCIIGOJ DE LA KASISTO.

Sro Dro Viktor Bruck, el Roma sendis por la asocia kaso du foje po 5 L.

Sro Josef Silhart, trajnrevizoro el Nymburk sendis 20 ĉk.

Kvitanante la ricevon de la supraj sumoj, ni esprimas al ili nian sinceran dankon.

Kasislo.

REDAKCIAJ SCIIGOJ.

La redakcio atentigas la anojn al kiuj event. mankas iu nro. de nia revuo komence de Januaro, ke ili bonvolu sciigi tion al ni, sendante en letero 1 respondkuponon, kaj ni sendos al ili la mankantan nron.

Same ni petas tiujn kiuj deziras havigi al si ĉiujn nrojn de nia revuo komence de Januaro ĝis Julio, ke ili sendu al ni po 1 respondkuponon por unuopa ekzemplero kaj ni sendos al ili la deziritajn numerojn.

Dezirante komence de nova asocia jaro pli beligi ankaŭ la eksterajn de nia revuo, ni petas ĉiujn anojn, kiuj havas iajn proponojn tiurilatajn ke ili bonvolu tion al ni sciigi.

Samtempe kun la proponoj, ni petas sendi al ni eventualajn desegnaĵojn preparitajn por fari de ili klisojn. La desegnaĵoj devas esti duoble aŭ eĉ kvaroble tiel grandaj, kiel estas unu paĝo de nia revuo.

Se estos eble ni donos al la revuo apartan kovrilon, kaj por tiu ĉi kovrilo ni bezonus skizojn, desegnojn k. s.

Dezirinda estas desegnaĵo entenanta flugilradon kaj stelon kaj sub ili desegnitajn tekston »La Fervojisto« Oficiala informilo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj. Monata fakrevuo pri fervojo.

La proponoj devas veni plej malfrue ĝis la 15 de Augusto.

Gekolegoj helpu al ni efektiviĝi nian deziron.

Redakcio.

FERVOJA TERMINARO.

Korektoj kiuj devas esti farata en Numero 5 kaj 6 de »La Fervojisto«.

1. Digo: devas legi »aŭ alia materialo tiel farita ke ĝi iĝas netrafluebla barilo kontraŭ akvo aŭ Noto: Tiu ĉi ŝajnas pli klara, kiel ĝi estas presita la frazo ne estas tute klara.

2. Ellasita la difino de

Hakita ŝpalo: Ŝpalo kiu estas hakita je almenaŭ du facoj (flankoj).

3. Splitŝpalo devas legi: »de tioma grandeco, kioma ebligas la faradon de du aŭ pli posekcio.

4. La difino de Sukŝpalo estis metita al titolo »Hakita Ŝpalo« ĝi devus legi

Sukŝpalo: Ŝpalo kiu montras pli ol la difinitan (ĝustan) kvanton de sukligo laŭ traprofilo aŭ kverprofilo.

5. Sablo la difino ellasita kaj la vorto metita kiel ĉeftitolo super »cindroj« ĝi devas esti:

Sablo: la malmola, grajna, dispecetigita roko kiu frapasas No 1 kibrilon kaj retenigas sur kibrilon No 50.

Cindroj: kiel presita

6. Forkpeca Numero (ekvacio ne estis komplete presita)

$$= \text{kot. } \frac{\alpha}{2}$$

7. Vopeco: legu »la vopeco havas du punktojn de intersekco« anstataŭ intersekto

Trakforkaj Ernomoj:

Vopeco Pinto efektiva oni konsideras esti la punkto kie la spurfacoj de la pintreloj disiĝas je 12.8 mm.

Spurfacoj devas esti mezurataj ĉe punkto 15.5 mm malsupre de la relsupraĵo.

Flanĝejo estas la interspaco inter kontraŭrelo kaj vopeco aŭ trakrelo, kaj devas mezuri proksimume 45 mm ĉe spurfacoj.

Forkpecoj: En la ordinara tipo la reloj estas kunmetitaj nemoveble sed ekzistas alia tipo nomita risorta forkpeco je kiu la vopeca kontraŭrelo kiu kunigas kun la rekta »interrelo« estas tenata tuŝanta la vopecon per risorto. Tiamaniere la relo de la ĉeftrako restas sen interrompo por la pasigo de ĉefvoja trajno. Kiam trajno rulas sur la malĉeftrako la flankoj de la radoj puŝmalfermas la interspacon inter la vopeco kaj vopeca kontraŭrelo, tiel permesante la pasigon de la radoj. Post la paso de rado la risorto refermas la interspacon.

Forkpeca Plato: sub la forkpeco estas vinktila ŝtalplato aŭ platoj.

Vopecaj Kontraŭreloj estas la kontraŭreloj ambaŭflanke de la vopeco kaj tre proksime al ĝi.

Forkpecaj Kontraŭreloj estas la k. reloj metitaj kontraŭe de la forkpeco apud la trakreloj kaj apartigitaj de ili per disblokoj.* Ili funkcio estas gvidi la flankojn de la radoj por ke ili ne frapu la vopecpinton.

Leviga Bloko estas fera, ŝtala aŭ alia materiala bloko metita en la angulon de vopeco inter la du pintreloj. La malantaŭa aŭ larĝa ekstremo estas malpli alta ol la relsupraĵo. Ĝia funkcio estas levigi iun trouzitan »rulsurfacon« de rado, alproksimiĝantan de la »malantaŭo« por ke ĝi ne havu tendencan apartigi la pintrelojn. Post trouzado la »rulsurfaco« de rado sukigigas, kio donas tian tendencan al la rado. Per tiuj ĉi blokoj la vivo de forkpeco estas plilongigita je almenaŭ 50 procentoj.

*Dis(ig)blokoj estas ferblokoj metitaj inter la flankoj de du erloj por teni ilin je la ĝusta disiĝo.

Pivota Disbloko estas la bloko metita ĉe la pivoto inter la komutreloj kaj la fiksrelo por teni ilin je ĝusta disiĝo.

Kontraŭreloj estas ankaŭ uzataj en aliaj lokoj kaj ĉe kurboj de malgranda radio.

Risortkomutreloj estas ankaŭ fabrikataj. La risorto tenadas la komutrelojn laŭ la pozicio por ĉeftrako. Trajno alproksimiĝanta sur la malĉeftrako de la pivotoj, aŭtomate malfermas la komutrelojn kiuj poste refermiĝas per ago de risorto.

Komutrela Disiĝo: Ĉiam unu el la du komutreloj restas tuŝante unu fiksrelon kaj la alia apartiĝas tiom da cm. de la fiksrelo. Tiun ĉi interspacon oni nomas »Komutrela Disiĝo«. Ĝi devas esti sufiĉe por libere pearnesi la pason de la radoj.

Plifortiga Peco: La komutreloj estas fortranĉitaj laŭlonge de la parto de ilia longeco por lasi ke ili kuŝu tuŝante la fiksrelon. La efektiva pinto de la k. relo estas malpli alta ol la fiksrelo. Tiel ĝi ne ricevas frapon de la radoj ĉe ĝia plej malforta parto.

Laŭ brita praktiko la bazo de la fiksrelo estas parte fortranĉita por enlasi la bazon de la komutreloj. Tiu ĉi sistemo necesas specialan fiksrelon.

Laŭ usona praktiko nur la komutrelaj havas la bazojn fortranĉitajn. Tiu ĉi sistemo permesas la uzon de k. relo kontraŭ iu ajn trakrelo. Por plifortigi la pintojn de la komutrelaj ofte oni vinklas pecon de ŝtalo laŭlonge tiamaniere, ke, kiam la k. relo kuŝas kontraŭ la fiksrelo la aldonajo kuŝas inter kapo kaj bazo de la fiksrelo. Tiu ĉi vinklita peco estas (Pl) forliga peco.

Senpintaj komutrelaj: En tre malmoderna »trakarejo« oni ankoraŭ trovas alian specon de komutrelaj. Ili estas la plej simplaj kaj la plej danĝeraj. De »forpeco« ĝis »pivotoj« la »forkaĵo« restas same. Tiam, anstataŭ fiksreloj kaj komutrelaj oni havas nur du trakrelojn. Se la longo de la trakrelo estas 10 m, do nur la 5 m pli malproksime de la pivotoj estas najlitaj al la ŝpaloj. Estas eble movigi la aliajn 5 m flanken. La refinado ĉe la antaŭe nomita pivotpunkto nun povas trafi aŭ la ĉeftrakan refinon aŭ la »interrelan« refinon laŭdezire. Memvideble estas ke, se trajno alproksimiĝas de la forkpeco kaj la komutrelaj ne estas korekte lokitaj, ne povas okazi aliaĵo ol »disreliĝo«.

Relfortigiloj estas kutime speco de angulaĵo lokitaj ĉe la ekstera flanko de fiksrelo aŭ trakrelo ĉe kurboj.

Komutrelaj vergoj: La du komutrelaj estas tenataj aparte je la ĝusta distanco per vergoj. Al unu el ili estas ligita plilonga vergo per kiu la komutrelaj estas manipolataj. Tiu ĉi konektas kun ia ajn sistemo de »interŝlosa« en uzo kaj estas nomita »Funkciiga Vergo«.

En malgravaj traksistemoj aŭ en manovrejo kie la komutrelaj ne estas interŝlositaj, la funkciiga vergo estas manipolata per indika signalaĵo kiu konsistas el turniga aparato kun disko kaj lanterno. Tiuj ĉi turnas laŭ la pozicio de la komutrelaj. Ili ankaŭ povas esti enlignitaj en interŝlosa sistemo.

Redsplintoj estas ŝtalaj platoj aŭ angulaĵoj per kiuj la ekstremaĵoj de du reloj estas kunigitaj. Ĉiu »splinto« havas de 4 ĝis 6 truojn kiuj koincidas kun similaj truoj en la refinaj kaj tra kiuj oni metas (rel)boltojn.

En samideano sugestis »ekliso« por tiuj ĉi (a: fishplate; us: anglebar; f: éclisse; h: eclisa; kubohispane: mordaza; it: stecca; g: Lasche).

Ekliŝo estas mallonga vorto sed en la vortaro Francais-Esperanto de Sro Grosjean-Maupin li tradukas éclisse kiel »splinto«, kiu neniel enhavas la ideon de kunigilo sed nur disfendaĵo. Splinto havas la saman ideon de kunigilo ĉe ĉirurĝio. Ĉar ĝi estas mempriskriba vorto ĝi ŝajnas al mi taŭga.

Relbolto: Tiu ĉi bolto diferencas de ordinara bolto ĉar ĝi havas sub la kapo-kium parton oni nomas la »kolo« — ovoforman aldonajon. Kelkfoje ĝi estas kvadrata. Tiu ĉi elstaraĵo sur la »trunketo« de la bolto eniras ingejon en la truo de la splinto. Ĝia funkcio estas.

Kapŝlosa eviti la turnigon de la bolto en la truo kaj estas nomita »kapŝlosa«.

Relnajlo aŭ Traknajlo: estas peza kaj dika najlego uzata por fiksi la relojn al la ŝpaloj.

Kontraŭrampaĵo estas io fiksita al bazo de relo, kiu trafas kontraŭ flanko de ŝpalo kaj tiamaniere malhelpas la rampadon de reloj laŭlonge.

Ŝlosŝraŭbino aŭ Ŝlosringo (laŭtipe), speco de ŝraŭbino aŭ risortringo por eviti la malŝraŭbigon de ŝraŭbino.

Trakŝraŭbo estas longa ŝraŭbo kun kvadrata kapo, uzata por fiksi relojn al ŝpaloj

Piedgardilo: estas peco, kutime metala, enmetita inter la kontraŭreloj kaj trakrelo aŭ pintrelo, kie la interscipo plilargiĝas. Ĝia funkcio estas malhelpi ke piedo eniru, kiu alie eble kaptiĝus.

Redsidplato: estas ŝtala plato metita inter la bazo de relo kaj la ŝpalo por malhelpi ke la relo tranĉu la lignan ŝpalon.

TERMINOJ UZATAJ JE TERMEZURADO.

Mezurrubando: Tiu ĉi estas rubando ŝtala aŭ ĉeno de antaŭfiksita longeco, markita decimale.

Mezurĉeno: kutime. La rubando havas surluditajn markojn; la ĉeno metalajn pendaĵojn por indiki la subdividojn.

Vidvergo, vidstango: Maldika pinta stango, alterne kolorigita kelkfoje, kiu estas uzata por loki punkton sur la grundo per teodolito aŭ alia direktortrovilo.

Perpendiklilo aŭ plumŝnuro: fadenego kun pinta pezaĵo ĉe fino uzata sub teodolito aŭ alia instrumento por fiksi la instrumentcentron ĝuste super donita punkto.

Mezurpingloj aŭ sagoj: estas longaj drataj pingloj kun ringo ĉe unu ekstremaĵo, uzataj de mezuristoj por indiki sur la grundo la finon de ĉiu mezurrubanda unuo.

Teodolito: estas teleskopo muntita sur (kver)*, akso kuŝanta en du forkoj tiamaniere ke oni povas klinigi ĝin aŭ supren aŭ malsupren. Se la teleskopo estas tute renversebla tra 360 gradoj en Usono oni nomas tian instrumenton »Transit«.

Supraplato aŭ cirklaĵo: La forko mem estas fiksita al rotaciebla gradigita plato, kiu.

Subplato siavice rotacias sur aŭ kontraŭ alia gradigita plato. (Subplato aŭ cirklaĵo) la du platoj povas esti kunefiksataj kaj tiam estas kune rotacieblaj. Orte al.

Vertikala kaj muntita sur la suprecilita teleskopakso estas alia gradigita ringo aŭ

cirklaĵo cirklaĵo per kiu oni mezuras la vertikalajn angulojn per kiuj la teleskopo kliniĝas de la horizontalo.

Vertikalaj aksoj: Tiuj ĉi estas konusformaj. Tiu de la supraplato estas muntita interne de la subplata konuso.

Vertikala aksingo: La akso de la subplato rotacias en tri aŭ kvarbraka ingo subtenata

Niveligaj per tri aŭ kvar vertikalaj ŝraŭboj. Per tiuj ĉi oni povas alĝustigi la nivelecon

ŝraŭboj de la platoj kiel ankaŭ la tutan instrumenton.

Siavice la niveligaj ŝraŭboj bazas sur alia tri aŭ kvarbrakaĵo kiu estas fiksita per ŝraŭbo al la tri piedililo. Ĉiu el la tri piedoj estas aparte movebla kaj alĝustigebla. Per ili oni alĝustigas la instrumenton al la malebeneco de la grundo.

Aerbulaj niveliloj: sur la supraplato, ĝenerale kuŝas du aerniveliloj orfe unu al la alia. Ili estas por faciligi la starigon de la instrumento en ĝusta pozicio. Laŭlonge de la teleskopo estas alia plilonga aernivelilo. Ĉiuj tri niveliloj estas gradigitaj.

Teleskopaj eroj.

Krucfadenoj: Ĉe la okulsenso en ringo estas krucigitaj araneaĵoj fadenetoj. En kelkaj instrumentoj oni anstataŭas la araneaĵon per tre delikataj linioj gravuritaj sur vitra plafeto aŭ »diafragmo«. La kruco markas la optikan akson de la teleskopoj ĉe la okulsenso kaj ebligas la fiksadon per teleskopoj de iu punkto. La pozicio de la ringo enhavanta la krucon estas alĝustigebla.

Kompaso: Alfiksita al mullaj teodolitoj estas kompasoj. Laŭdeziro, oni povas tiel aranĝi ke la »nulmarkoj« sur la horizontalaj platoj koincidu kun la magnetaj nordpunktoj tiel ke, turnigante la teleskopon »azimute« t. e. horizontale oni povas legi la magnetan azimuton rekte sur la cirklaĵoj.

Vernieroj: Por subdividi la gradojn sur la cirklaĵoj oni uzas vernieron.

Noktlanterno kaj malsolida teleskopa akso:

Por plifaciligi la observadon nokte estas necese ke la araneaĵo estu lumigita. Tiu ĉe la teleskopa akso ofte estas farita malsolida. Ĉe la centro de la akso estas metita speguleto tiel ke lumo de lanterneto lokita ĉe unu ekstremo de l' akso brilas sur la speguleton kaj estas reflektata sur la araneaĵon.

Tangantaj ŝraŭboj: Por ebligi tre precizan alĝustigon de la vernieroj ambaŭ la vertikala kaj horizontala cirklaĵoj havas tangantajn ŝraŭbojn. Tiuj ĉi havas tre delikatan ŝraŭbreton. Tial ĝi necesas multajn turnojn por movi la cirklaĵojn tra unu grado. Dezirante legi cirklaĵan gradon oni unue direktas la teleskopon al la objekto. Kiam la krucfadenoj trafas proksimume la objekton oni fiksas aŭ la teleskopon.

Krampo aŭ la supraplato per krampo. Tiam turnante la tangatan ŝraŭbon oni alĝustigas la krucfadenojn al la objekto. La rezulton oni legas per verniero.

Fokuso: Ambaŭ la »objektivo« kaj »okulsenso« estas fokuseblaj. La unuan oni faras per dentrelo kaj ŝraŭbo; la lastan kutime oni faras glitigante la lensenhavantan tubon en alia tubo kiu formas parton de la teleskopoj.

Paralakso: La »enfokusado« de la okulsenso oni nomas la »alĝustigo per paralakso«. Se oni ne faras tion la objekto ŝajne movus ĉiujfoje kiam oni movus la okulon.

Nivelilo

Nivelilo: Tiu ĉi konsistas el horizontala teleskopoj kuŝanta en du forkoj proksime al ĝiaj ekstremoĵoj. Malsame al teodolito ĝi ne estas movebla vertikale sed nur horizontale. Ĝi ankaŭ havas tri aŭ kvar niveligajn ŝraŭbojn kaj estas simile muntita.

Ĉe la okulsenso estas ankaŭ aranea krucaĵo, iomete diferente aranĝita ol tiu de la teodolito.

Sub aŭ super kaj laŭlonge de la teleskopoj estas aerbula nivelilo eble 15 aŭ 20 cm longa. Orte al tiu estas mallonga helpa nivelilo por rapidigi la starigon de la instrumento.

Estas du specoj de niveliloj. La usona tipo estas nomita »Y« (elp. eŭaj) kaj la eŭropa nomita

»Dumpy« (Dŭmpi). Por alĝustigi la »Y« oni malfermas la forkojn eltiras la teleskopon kaj remetas ĝin kun ekstremoĵoj renversitaj. Oni ankaŭ povas rotaciigi la teleskopon ĉirkaŭ optika akso en la forkoj. Ambaŭ movoj necesas por alĝustigo.

Dumpy postulas alian sistemon de alĝustigo pli komplika.

Nivel(vid)stango: Por uzado kun nivelilo. Ĝi estas gradigita, kutime de kvadrata kverprofilo, kaj estas etendebla ĝis ĉirkaŭ 5 metroj sur kiu oni legas la ciferojn per nivelila teleskopoj. Ĉe ambaŭ nivelilo kaj teodolito la vidata imago en la teleskopoj estas renversita se la teleskopoj ne havas specialan lensojn por eviti tion.

Fonopoj; FNP: estas mallongigo por »Fiksa nivelpunkto« a kaj us. Benchmark aŭ B. M. f: repere; g: Festpunkt, Höhenmarke, Fixpunkt; i: caposaldo, pinto fisso; p: penepre; hispane pinto fojo. Je iu sistemo de niveloj estas necesa fikspunkto, la alteco de kiu, aŭ estas sciata aŭ supozita. Sur tiu ĉi fikspunkto estas bazotaj ĉiuj aliaj altecaj valoroj. Tiam punkton oni nomas F. N. P. aŭ Fonopoj.

Nivelante, post starigo de la instrumento oni direktas la teleskopon al nivelstango tenata sur F. N. P. Tiam ĉi vidon aŭ legaĵon oni nomas malantaŭa.

Rotaciante la teleskopon oni nun direktas ĝin al la nivelstango nun tenata ĉe alia punkto sur la grundo pri kiu oni deziras scii la altecon. Tiam ĉi legaĵon oni nomas la antaŭa. Dum la nivelstango restas ĉe la lasta punkto oni movigas la nivelilon al alia punkto pli antaŭe lokita laŭ longe de la vojo nivela.

Restarigante la instrumenton oni denove faras malantaŭan legaĵon kaj tiel plu ĝis la fino de la laboro. Iu ajn legaĵo alia ol la du cititaj oni nomas »interlego«.

La punkton kie la nivelstango restas dum la movado de la instrumento oni nomas »turnpunkto«. Dum la laboro de nivelado ne estas permesata ke la nivelilo kaj nivelstango estu samtempe for de la grundo. Se tio okazus la laboro malvalorigus.

Interlegoj estas malpli gravaj ol turnpunktoj ĉar se okazus eraro ĉe legado de interlego la eraro nur efektas tiun punkton. Sed ĉi eraro farita ĉe turnpunkto daŭrigas kaj amasiĝas en la kalkulo kaj malvalorigas la rezulton.

Azimuto: estas la horizontala angulo for de la nordpunkto aŭ de antaŭdecidita bazlinio kaj estas mezurata angule sur la horizontalaj cirklaĵoj de teodolito.

Prisma Kompasso: estas nur ordinara kompasso kun prisma lenso por legi la gradojn. Tiu ĉi lenso pligrandigas ilin kaj per la prismo ebligas ke la okuloj samtempe vidu la objekton celatan kaj legi la gradojn.

Mannivelilo: estas mallonga nivelilo tenebla en la mano. Per reflektita prismo oni samtempe povas vidi la objekton kaj la nivelan aerovezikon. Ĝi estas tre utila por mezuri kverprofilojn. Kelkaj havas kombinitajn en la sama instrumento, mannivelilon kaj prismatan kompason.

Registrilibroj: La speciale liniitaj libroj por registri la legaĵojn faritajn de teodolito kaj nivelilo.

Planisto kaj Desegnoj.

Planisto: Post la kamplaboro venas la desegna aŭ planlaboro. Tiu kiu faras la planon estas nomita desegnisto aŭ planisto.

Por fari planojn oni bezonas la jenajn aĵojn:

Skaloj: gradigitaj liniiloj; cirkelo; liniiga plumo, krajonoj, gradigita angulilo.

Triangulo (aĵo) ankaŭ: Tiu ĉi estas triangulforma liniilo kun anguloj de 45, aŭ 30 kaj 60 gradoj.

La tria angulo estas ĉiam 90 gradoj. Ankaŭ necesas: »hinda« aŭ nigra inko kaj diverskoloraj inkoj aŭ koloraĵoj. Por fari kopiojn de desegnoj oni trakopias la planon sur aŭ tra »kopitolo« aŭ »kopipapero«. Uzante tiujn kiel kliŝaĵojn oni per lumo presas sur ferocianidan paperon. Tiu ĉi rezultas en blankaj linioj sur blua fono. Presante unue sur »Vandyka« papero oni faras kvazaŭ negativan kliŝaĵon. Lumpedante tra tiu, ĝi rezultigas blujn liniojn sur blanka fono. Oni povas lumpresi per sunlumo uzante nur simplan kadron aŭ en speciala elektra presmaŝino, elektrike.

Por fiksi la paperon al la desegnotablo aŭ tabulo oni uzas puŝpinglojn.

Tre utilas la »glitkalkulilo«. Tiu ĉi estas nur rektigilo sur kiu estas markitaj skaloj decimale kaj logaritme subdividitaj.

Planimetro: estas instrumento por mezuri la areojn de nesimetriaj kaj neregulaj areoj sur plano.

Kartrulmezurilo: estas instrumento kiu havas malgrandan radeton dentrade konektitan al indikilo kiu moviĝas sur la faco de ciferplato. La ciferoj registras la distancon kiun rulas la radeto.

Paralela liniilo: La plej simpla formo estas du liniiloj konektitaj per du moveblaj ligiloj aŭ brakoj sed la pli bonaj estas nomitaj »rulparalela liniilo«. Preskaŭ ĉe ĉiu ekstremo ĝi havas radetojn kuplitajn unu al la alia kaj tiel aranĝitajn ke ili ĉiam rulas paralele.

Kurba liniilo: Por facilmeti grandradiajn kurbojn sur la papero oni povas uzi la »kurboliniilojn« kiuj estas nur plataj liniiloj tranĉitaj laŭ la speciala radio dezirita.

Desegna Papero.

Krom la ordinara desegna papero oni multe uzas profilan kaj kverprofilan paperon.

Profila Papero: kutime ĝi estas liniita per proksime spacigitaj horizontalaj linioj dum la vertikalaj linioj eble estus aparte 1 cm.

Kverprofila Papero: estas liniita kvadrata per linioj egale spacitaj vertikale kaj horizontale. Ĉiu kvina aŭ deka linio estas presita plidika.

Kutime la vertikala skalo de profiloj estas desegnata multfoje pligranda ol la horizontala skalo. Ekzemple: Se la horizontala skalo estas 1:400, do, la vertikala estus 1:40 aŭ eĉ 1:20. Tiu ĉi estas farita por pliklare montri la diferencojn je nivelo.

Edward M. Rosher.

NOVAJ ANOJ.

450. Dvořáček Rudolf, staciestro, Nove Město n/M. Bohemujo, stacidomo, (nadraži).
451. Peroutka B., staciestro, Olšany, Bohemujo, stacidomo, (nadraži).
452. Dobry Vojtěch, staciestro, Žandov apud Cheb, Bohemujo, stacidomo.
453. Fikrle Frant., inspektor ĉe la Reditelství st. drah, Bratislava.
454. Dzura Leo, ĉefrevidento, Petrovice apud Bohumin, stacidomo, Ĉeĥosl.
455. Haša Adolf, oficisto ĉe la fervoja direkcio, — Praha-Jih, od VIII/1.
456. Pfeifer Rudolf, ferv. asistento, Bor u Č. Lipy, stacidomo, Ĉeĥosl.
457. Sourek V., ferv. kasiso, Bor u Č. Lipy, stacidomo, Ĉeĥosl.
458. Babór Josef, lokomotivestro, Velký Osek apud Praha, stacidomo.
459. Forejt Bahumil, lokomotivestro, Velký Osek apud Praha, stacidomo.
460. Písařík Vacl., ferv. oficisto, Benešov apud Praha, stacidomo.
461. Šimánek Jan, ferv. suboficisto, Břevnov apud Praha Nro 492.
462. Filipi Josef, konduktoro, Praha-Vinohradi, Manesova Nro 42.
463. Šlapák Karel, konduktoro, Praha-Žižkov, Krašova Nro 20.
464. Kouř Josef, ferv. laboristo, Praha-Vršovice, Nerudova Nro 8.
465. Plejša Jos., ferv. laboristo, Koloděje apud Praha Nro 53.
466. Pytloun Frant., konduktoro, Bakov, stacidomo, Bohemujo.
467. Šolc Josef, vypravčí vlaku, Mlada Boleslav, mistní draha, Bohemujo.
468. Svořoda Alois, ferv. revidento, Veselí Nro 203, Bohemujo.
469. Troup Antonín, inspektor kaj staciestro, Hluboká n/ Vltavou, Bohemujo.
470. Rezníček Jiří, ferv. revidento, Mariánské Radčice, nadraži, Bohemujo.
471. Kraus Rudolf, fervojisto, Černčice, nro 13, u Loun, Bohemujo.
472. Galamboš Štěpán, fervojisto, Bratislava, ředitelství st. drah, odd. VII.
473. Feisette Jaroslav, inspektor kaj staciestro, Sudoňovice N. Čechy.
474. Holý Jan, ferv. oficisto, Hrušovany-Šanov, nádraží, Morava, Ĉeĥoslovakio.
475. Daniel Frant., ferv. ofic., Hrušovany-Šanov, nádraží, Morava, Ĉeĥoslovakio.
476. Kafka Vinc., ferv. oficisto, Hrušovany-Šanov, nádraží, Morava, Ĉeĥoslovakio.
477. Večeřa Karel, ferv. revid., Hrušovany-Šanov, nádraží, Morava, Ĉeĥoslovakio.
478. Vedra Jos., ferv. adjunkto, Hrušovany-Šanov, nádraží, Morava, Ĉeĥoslovakio.
479. Šplechtňa Jos., ferv. revidento, Lázně Kynžvart, nádraží, Bohemujo.
480. Martin Dahlin, kontoristo, Oertofta, Svedujo.
481. Eugen Mühlner, fervojisto, Allmendshofen bei Donaueschingen, Landstr. 77., Germanujo.
482. John Sjöholen, fervojofic. St. Eriksgatan 128 A II., Svedujo.

483. Carl Erik Strandberg, fervejof. St. Eriksgatan 128 A II., Svedio.
484. Henrik Campen, fervejofic. Budapest I. Marvany ul. 27, II. 23, Hungario.
485. Franz Horwath, fervejofic., Wien X., Laxenburgerstr. 2, Austrio.
486. Petar Dragutin, fervejisto, Zagreb, Strojarska cesta, Jugoslavio.
487. Žužić Mihajlo, fervejisto, Vrhovčeva ul. 10. Jugoslavio.
488. Pavlič Petar, fervej., Zagreb, Strojarska cesta Jugoslavio.
489. Lobnik Jakob, fervejofic., Zagreb, Vodovodna ul. 14., Jugoslavio.
490. Koops Claus, E.O. S., Darmstadt, Eschollbrückerstr. 44.
491. Sahler Josef, Eisb. Insp., Hattingen (Ruhr).
492. Bierhoff F., E. S. Westhofen (Westf.) Sydstrasse 7.
493. Schrank Max, Bahnverw., Kempten, Allgäu.
494. Junker Heinrich, Eisb. Insp., Bremen, Hohenzollernstr. 15.
495. Ebrecht Richard, Eisb. Insp., Gotha, Ohrdrufferstr. 26.
496. Dreiocker Klara, Breslau 8, Brockauerstr. 20.
497. Jäckel Luise, E. S., Breslau 2, Palmstr. 12.
498. Bierbaum Marie, A. Ass., Eisenach, Heinrichstrasse 40.
499. Broistedt Martha, E. Ass., Holzminden.
500. Höfer A., Eisb. Insp., Chemnitz, Wilhelmstr. 22.
501. Schneider Christian, Lokf., Leutkirch, Allgäu.
502. Haeckel Mx, Leipzig, Allenburgerstr. 18.
503. Boche Paul, E. S. Wurzen, Bahnhof.
504. Keseberg Paul Rech. Rev., Cassel-Rothenditmold, Wolfhagerstr. 222.
505. Blankenheim Max, Bln-Steglitz, Stubenrauchplatz 5.
506. Gruber Walther, Eis. Ass., Bornitz b. Oschatz.
507. Werner Kurt, E. Ass., Niederau b. Meissen, Weinböhlauerstr. 26.
508. Weitzmann Gerhard, E. O. S., Lommatzsch, Bahnhof.
509. Hennicker, E. S. Wolkenburg (Mulde).
510. Pietsch Gustav, Sekr. d. D. E. V. Berlin W. 10 Genthinerstr. 3.
511. Winkler Wilhelm, techn. E. S., Berlin O. 112, Müggelstr. 25.
512. Neudorf Karl, Berlin SW. 47, Hagelberg str. 21
513. Förster August, Schirgisalde 265.
514. Lippmann Willi, Glashütte (Sa), Hauptstr. 37.
515. Panten Johann, E. Anw., Syke b. Bremen, Bremerweg 245.
516. Soller Heinrich, E. Anw., Syke b. Bremen, Nordstr. 247.
517. Sudmann Wilhelm, Hilfs Betr. A., Syke b. Bremen, Nordstr. 243.
518. Petzold Alfred, Eisb. Insp., Leipzig, Scharnhorststr. 43.
519. Porsch Hans, E. O. S., Pegnitz.
520. Eckhardt Ferdinand, Schreibgehilfe, Barrien b. Bremen.
521. Lange Heinrich, E. Anw., Syke b. Bremen, Cassunerstr. 133.
522. Krach Max, Schlosser, Nürnberg-Mühlhof 86.
523. Arimont Hans, E. S., Syke b. Bremen Gartenstrasse,
524. Lipperl Arthur, Lokf., Kötz b. Coswig. Fabrickstrasse 2.
525. Pietzschmann Emil, Weichenw., Dresden, Grillenburgerstr. 6.
526. Wengenroth Albert, Rangf. Anw., Westerburg i. Westerwald, Wilhelmstr. 21.
527. Pfeiffer Carl, Eisb. Insp. a. W., Aschaffenburg Bretanostr. 3.
528. Freiberg Paul, Saffler, Halle (Saale), Prinzenstrasse 17.
529. Kaiser Erhard, E. S., Probstzella, Güllerabf.
530. Lessing Bernhard, Telegr. Arb., Rossla a. Harz Zigelstr. 32.
531. Hilger Wilhelm, E. Anw. Weidesheim bei Cüchenheim, Dörfstr. 38.
532. Müller Eugen, Rangierer, Allmendshofen, bei Donaueschingen, Landstr. 77.
533. Koenig Arthur, Werkst. Schl., Schwerin i. M., Lübecerstr. 25.
534. Hildebrandt Wilhelm, Aush. Wärter, Grohs Behnitz.
535. Bonaventura Paul, Schlosser, Ottweiler (Saar) Brühlstr. 10.
536. Stumpfegger Georg, Werkhelfer, Salzburghofen b. Freilassing, Saufnerstr. 51.
537. Wagner Otto, Tel. Vorarb. Leipzig-Lindenau, Wielandstr. 8.
538. Wolf Waller, Leipzig, Brandvorwerkstr. 51.
539. Felten Wilhelm, Bm. Schreibh., Cüchenheim, Breitestr. 202.
540. Heinen Matthias, Zugführer, Euskirchen, Commernerstr. 19.
541. Gieren Josef, Betr. Ass., Odendorf b. Euskirchen, Oberstr. 85.
542. Neuss Zeter, Betr. Ass. Euskirchen, Roitzheimerstr. 18.
543. Kremp Josef, Betr. Ass., Euskirchen, Roitzheimerstrasse 18.
544. Fahnenschreiber Theodor, E. Betr. Ass., Euskirchen, Alleestr. 8.
545. Stockart Anton, Schreibhilfe, Euenheim b. Euskirchen No 16.
546. Engelskirchen Ingelbert, E. Betr. Ass. Euskirchen, Kölnerstr. 148.
547. Heinen Josef, Schaffner, Euskirchen, Commernerstr. 19.
548. Braml Wilhelm, Lindau-Bodensee, Binderg. 27
549. Dudda Heinrich, Aushelfer, Steele - Ruhr, Buschstr. 60.
550. Obstmeier Ludwig, Gehilfe, Karpfham 2, Bayern.
551. Hase Gswin, Weichenwärter, Dresden A., Lortzingstrasse 5.
552. Brauer Alfred, Hilfszugschf., Dresden N. Rehefelderslr. 5.
553. Kauka Otto, Betriebsstellmacher, Nimitz b. Käbschütz (Meissen).
554. Engst Johannens, Dresden A, Kronprinzenplatz 10.
555. Knappe Martha, Sekr. d. Fachschule, Dresden, Falkenstr. 20.
556. Walter Erich, H. Amtsdienner, Dresden-Coschütz, Bismarkstr. 7.
557. Beyer Friedrich, E. O. Insp. Freital-Po, Unt. Dresdnerstr. 38.
558. Möbius Martin, Eis. Geh., Dresden A. 1., Kristianstr. 5.

559. Fiegel Martin, E. Ass. Amberg Opf. F. 94, Marienstr.
 560. Berck Willy, Wagenschreib., Essen-Frintrop, Höhenweg 84.
 561. Gramer Max, Aus. Weichenst., Breslau 23., Zoblenstr. 5.

KOMPLETIGO KAJ SANGO DE NIAJ STATUTOJ.

La unua, kiu sendis siajn opiniojn pri nia ŝanĝpropono de statutoj estis unu el niaj germanaj amikoj.

Tiu nia germana amiko proponas jenajn ŝanĝojn:

1. § 1. Nomo: Int. asocio de E. F. (ne, de «la» E. F.) ĉar ĝi ne estas asocio de ĉiuj ekzistantaj ferv. esp. sed nur de parlo.

2. § 8. Laŭ via propono do ekz. ankaŭ povas fariĝi ano germana ferv. esp. kiu ne estas ano de nia landa organizo? Se vi tion intencas ĉi tiuj fervojistoj (do la ne anoj de landa organizo) devus pagi pli altan kotizon ol la anoj de la landa organizo. Alie — por ŝpari kolizon — multaj aliĝos nur I. A. E. F.

3. § 9. Mi estas kontraŭ la propono akcepti en la asocion ankaŭ ne ferv.

4. § 12. Kial konjugi AH de la nombro de AB?

5. § 14. Nur »proponi«?

Oni lasu al ĉiu landa organizo nomiĝi kiel ĝi volas. Pli malnovaj landaj organizoj ne ŝanĝas nomon pro I. A. E. F. La germana ne ŝanĝos sian nomon.

6. § 15. Sub »devoj de la anoj« forstrekite alineon c). Tio estas postulo nur sur la papero. Aŭ ŝanĝu en »varbi novajn anojn«.

7. § 18. La voĉdonado devas esti »sekreta«.

Tio estas demokrata sistemo.

8. § 21. admoni per »poŝtkarto« estas ofendo kaj en Germanujo ne permesate.

9. § 30. d) Kun kiu rajto volas I. A. E. F. »monpuni« siajn anojn? En neniu alia loko de la statuto mi trovis rimarkigon, kiam ano devas esti punata, kaj nenion pri la sumo.

10. § 36. Devas teksti . . . ĝis kiam ia asocia jarkunveno decidis («ne» forstrekil).

11. § 62. La jarkunveno devas povi diskuti ankaŭ pri gravaj proponoj ne publikigitaj en tagordo, se la plimulto tion deziras. Tio estas kutimo en Germanujo.

12. § 65. Kial la membro, kiu proponas, ne rajtas voĉdoni? En Germanujo tio ne estas kutima.

13. § 69. elekto de la jarkunvena estraro nur, se la asocia estraro ne partoprenas, alie ĝi ja estas ankaŭ jarkunvena estraro (laŭ § 68.).

14. § 70. La destinoj pri arbitracia tribunalo estas tro pezaj kaj laŭ mia opinio neniam efektiveblaj.

15. Ŝajnas al mi, ke vi ankaŭ en la statutoj tro komplikas la aferon. La destinoj de internacia regularo devas esti tute klaraj kaj facile kompreneblaj de ĉiuj anoj ankaŭ tute simplaj. La viaj postulas, ke ĉiu ano estu duona advokato. Ili ankaŭ estas tro longaj.

Pripensu nur »80 §§«. Vi ia bezonas 3 jarkunvenojn, por pridiskuti ilin. Aŭ ĉu vi fakte opinias, ke vi tion faros en Geneve? Mi ege dubas pri tio. Kaj se oni ne povas pridiskuti paragrafon laŭ paragrafo la tuta diskutado estos senvalora.

Ni povas tute konsenti kun proponoj: 1., 5., 6., 10., 12. kaj 13. Al aliaj punktoj jen mia opinio:

Al 2. Jes, ĉiu ferv. povas fariĝi IAEF ano ne estande samtempe ano de L. O. ĉar mia intenco estas, ke IAEF fa-

riĝu tute memstara, kaj plej grava fervojista asocio, kies anoj organiziĝas en lokaj kluboj kaj Landaj Organizoj (L. O.) nur por ke ilia asocia vivo estu pli vigla ol ĝi estis ĝis nun. Mia opinio estas, ke estas pli bone se unu fervojisto estas nur IAEF ano ol se ĝi estos nur ano de L. O. aŭ L. K.

Al 3. Estas necese ke IAEF akceptu ankaŭ ne ferv. kiel anojn, tion postulas financaj kaŭzoj. Ili estas nur membroj subtenantoj, aŭ aliel dirite nur abonantoj de nia fakrevuo.

Al 4. A. H. estos anoj kiuj nenion pagos, kaj mi intencis defendi la asocion de troalligo de AH, kvazaŭ devigante, ke la proponantoj de AH unue farigu unu AB, por ke la enspezo de la kotizo de AB, respektive ĝia rentumo certigu la elspezojn por A. H.

Al 7. Sekretan voĉdonadon ankaŭ mi proponis ĉe L. K. sed ĝi ne povas, kaj ankaŭ ne bezonas esti sekreta ĉe internacia faka asocio, kia estas nia IAEF.

Al 8. Mi petas informon ĉu la admono per letero estas permesata? Kial la admono per pk. estas rigardata kiel ofendo? Tio estas simpla sciigo ke la ano ne plenumis sian laŭstatutan devon.

Al 9. Tiu punkto estas strekota. Ĝi estis strekita ankaŭ en la antaŭa §.

Al 10. Mi denove akcentas, ke tiu metodo, kiun Vi proponas ne estas akceptebla ĉe pure internacia asocio, kia devus esti IAEF. Tio povas esti nur ĉe L. O. ĉe kiuj oni povas antaŭvidi kaj ordoni la necesan onon de ĉiuj anoj kiuj devas partopreni la kunvenon, kiu nur en tiu ĉi okazo povas decidi. Ĉe L. O. kaj precipe ĉe lokaj kluboj ankaŭ preskaŭ ĉiu ano havas la eblecon partopreni la kunvenon. Kontraŭe ĉe nia IAEF nur la malgranda malplimulto de niaj anoj povas ĉeesti. Sekve de tio, se niaj statutoj permesus la traktadon kaj decidon pri gravaj proponoj ne publikigitaj en la tagordo, tio ne estus okazanta laŭ la deziro de la plimulto sed laŭ deziro de la plimulto de ĉeestanta malplimulto de niaj anoj. Mi opinias, ke neniu nia ano povas preferi tiun lastan metodon, kiu plie ebligas eventualan insidan atakon kontraŭ la asocio.

Al 14. Vi pravas, mia intenco estis ke tiu lasta paŝo de repaciĝo estu sufiĉe longa, por ke ankaŭ la tempo povu influj kaj akceligi la repaciĝon!

Al 15. La plej grava manko de ĝisnunaj statutoj estas ilia mallongeco kaj simpleco! Se la proponitaj statutoj ne estas sufiĉe kompreneblaj mi opinias, ke ni devus ilin ankoraŭ plilongigi. Niaj anoj, kiuj tamen ne estos komprenintaj niajn novajn statutojn, petu klarigojn de estraro aŭ L. O.

Mi esperas ke la diskuto de tiu ĉi propono okaze de Geneva jarkunveno estos tre simpla, sed memkompreneble nur tiam, se ĉiuj niaj anoj ĝis tiam estos donintaj siajn opiniojn pri la ŝanĝpropono.

Okaze de transskribo de mia propono, kaj dum ĝia preso kaj korektado ekestis kelkaj eraroj. Jen kelkaj korektoj:

§ 39. Devas teksti:

Konsilantaro konsistas el:

- a) administranta estraro,
- b) ĉiulandaj asesoroj, kaj,
- c) revizora komitato.

§ 54. estas strekota, kaj ricevas tiun tekston: »Asociaj delegitoj povas partopreni la kunsidojn de konsilantaro, kaj doni siajn opiniojn, sed ili ne voĉdonrajtas.

La dua, kiu sendis siajn rimarkojn pri la ŝanĝpropono de niaj statutoj estis sro J. Blažek, ferv. inspektoro, nia vicprezidinto. Liaj rimarkoj estas:

(16) — § 4. b) kaj ĉ) li speciale aprobas, ĉar li proponis la samon, jam dum la Viena kongreso.

(17) — § 6. Aldoni: »Pri tiu ĉi programpunkto decidis 2/3-a (aŭ 1/2-a laŭ sperto) plimulto de (ĉeestantaj eĉ neĉeestantaj) skribe balotantaj IAEF-anoj, (do AA, AS, AB, AH). Sekreta voĉdonado«.

Rim. Per tiu ĉi voĉdonrajto larĝigita oni povas gajni ĉiam novajn anojn t. e. ekinteresos sin pli multaj fervojistoj k. t. p. pri IAEF.

(18) § 9. Subtenanta . . . (aldoni) »ĉiu pagita kotizo rajtas aŭ gajnas 1 voĉon en la jarkunveno«.

(19) § 13. 31, 66, 78 eble ankaŭ aliaj §§ rilate voĉdonadon — se eble — alkonformigi al la § 18. kies tekston mi proponas jenmaniere: (pro simila kaŭzo: ekinteresiĝi ĉiujn) »Voĉdonado estas malsekreta aŭ sekreta. Sekreta nur tiam, se ĝin postulas la statutoj aŭ 3 anoj diversnaciaj. Ĝi okazas aŭ persone, se la ano partoprenas la jarkunvenon, aŭ skribe (t. e. per p. k., letero, k. t. p. adresitaj al IAEF estraro) aŭ per plenrajtigiloj t. e. la voĉdonrajto povas esti transdonita al alia ano. Unu ano (AA, AS, AB, AH) povas prezenti 1–5 rajtigilojn.

(20) § 16. fakrevuon ankaŭ la AB kaj AH.

(21) § 25. Ĉiujare . . . Nove aliĝintaj anoj estos publik. laŭvice kune kun iliaj adresoj.

Ankaŭ oni devas ĉi tie diri, kiom pagas la anoj de Ligoj kaj kluboj diverslandaj? § 9. ne sufiĉas, ĝi ne estas klara tiurilate.

(22) § 54. Teksto: »Konsilantaro de la asocio konsistas el diverslandaj asociaj asesoroj kaj delegitoj (streki revizora komitato!)

(23) Tiu ĉi serioze konstruitan proponon ril. »Kompleto kaj ŝanĝo de IAEF statutoj« povas ĉiu sincera IAEF ano aprobi ĉar la ĉefprincipoj (neŭtraleco, plena indiv. rajto) restas konservitaj.

Ĉiu, kiu komprenas labori organize, vidas jam, ke grandaj estas la laboroj, kiujn faris niaj jugoslavaj kolegoj en ilia unua laborjaro. Dankon sinceran . . .«

Jen miaj klarigoj al unuopaj punktoj:

Al 17. Mia intenco estis doni voĉdonrajtojn nur al AA. Sed mi volonte ŝanĝus tiun ĉi mian opinion tiamaniere, ke ni ĉe la § 17 aldonu: »Kaj fervojistaj AB kaj AH«. Eventuale ankaŭ: »AB kaj AH«. Mi ne permesus voĉdoni al AS, ĉar mi ilin konsideras kiel anojn abonantojn.

Al 18. Mi opinias la proponitan aldonon esti superflua, ĉar la §§ 8, 9, 17 kaj 22 d.) tute klare difinas la rajton. Ĉu eble necesas akcenti, ke ĉiu ano rajtas nur unu voĉon?

Al 19. Mi konfesas, ke vidiĝas iomete stranga afero, ke mi ĉe niaj statutoj proponis malsekretan voĉdonadon! Sed mi petas pripensi nur ĉu la voĉdonado ĉe niaj asociaj jarkunvenoj povas esti sekreta, ĉar ni ĉiuj ja antaŭvidas, kaj plie eĉ ni jam el la historio de nia asocio precize scias ke ĉiuj niaj anoj neniam povos partopreni la jarkunvenojn. Mi diras ke ne ĉiuj, sed neniam la plimulto de ĉiu landaj IAEF anoj. Do la plimulto de niaj anoj donos siajn voĉojn aŭ skribe, al estraro, aŭ al asesoro de lando, kie okazos la jarkunveno, aŭ ili rajtigos alian anon voĉdoni por ili. Ĉu ni povas tion voĉdonadon nomi sekreta? Mi opinias, tion nebla! Kaj due, kiajn sekretaĵojn povos havi neŭtrala faka asocio?

Kontraŭe mi proponis la eblecon de sekreta voĉdonado ĉe statutoj de lokaj kluboj (LK) kaj landaj organizoj (LO).

La voĉdonado ĉe § 6. povas esti skriba.

La limigo de voĉdonrajtigo povus tre ofte esti maljusta en tiuj okazoj, kiam ekzemple unu sesa ano devus serĉi alian anon kiu ĝin anstataŭus.

Al 20. Ĉiuj anoj ricevas la fakrevuon.

Al 21. Mi konsentas. Sed pli bone estus dividi la 25. §-on el ĝia dua frazo kaj Via aldonu fari novan §-on post la 21-a, ĉar laŭsence ĝi tie apartenas. La teksto estus: »Nove aliĝintaj anoj estos publikigitaj laŭvice en la fakrevuo, kune kun iliaj adresoj.

La nomoj (firmoj) de AB kaj AH estos publikigitaj ĉiujare okaze de la publikigo de raporto pri ĝenerala jarkunveno«.

Alia punkto de Via rimarko rilatanta la kotizon de anoj de diverslandaj Ligoj kaj kluboj estas klarigita en la aldonoj de tiu ĉi propono. § 9. klare destinas ke AS povas fariĝi ĉiu nefervojisto (kiel reala persono) ankaŭ diversaj organizacioj (kiel juraj personoj).

Ĉiu ano pagas la destinitan kotizon, sed por ke la asocia vivo estu pli vigla 14-a § proponas la organizon de IAEF anoj en LK kaj LO. Laŭ proponitaj modelaj klubstatutoj la klubanoj pagos por la klubo apartan kotizon. L. Organizoj havas kotizon laŭ II. aldonu.

Al 24. Mi kore dankas al Vi — je mia nomo kaj je la nomo de aliaj estraranoj — por laŭdaj vortoj, per kiuj Vi honoris nin.

Mi vidas, ke la semoj, kiujn ni semis neniam laciĝante, ne perdiĝis, sed kontraŭe ke ili trovis bonegan fundon, el kiu ili jam ekgermis, kaj tie baldaŭ evoluigos grandega anaro de fervojfakaj samideanoj unuigitaj en IAEF, kiu devas fariĝi la plej granda organizo de la mondo.

§§ 15–21 estas kompletigitaj kun destinoj rilatantaj la partan pagadon de la kotizo, kiel tio en la 7–8-a nro de L. F. estas publikigita. La ĉefa destino ĉe tio estus, ke nur tiu ano paginta la kotizon partate havu rajton voĉdoni, kiu pagis antaŭ la jarkunveno almenaŭ 1/4-n da kotizo kaj enskribo pagon.

La tria, kiu sendis sian opinion estis nia estonia asesoro sro A. Pung, unu el la plej diligentaj niaj asesoroj kaj anoj. Li proponas:

(25) § 4. La asocio celas:

a) Ĉiesflanke progresigi intiman kunlaboradon inter la tutmonda gefervojistaro.

b) evoluigi la fervojan faksciencan, perfektigi la faksciojn de siaj anoj, interŝanĝi spertojn kaj profitigi ilin al la fervoja afero.

c) propagandi kaj instrui internacian lingvon Esperanton al la tutmonda gefervojistaro por ebligi al ili la senperan interrilatadon.

ĉ) klopodi enkondukon de Esperanto ĉe la fervojoj de la tuta mondo.

d) eldoni faksciencan literaturon, fakan revuon, flugfoliojn k. t. p.

e) helpi al la koncerna komitato de la Akademio la verkadon de la faka terminaro.

f) utiligi la Asocian organizaĵon kaj ĝiajn internaciajn rilatojn je interesoj de la anaro, kiel helpo dum vojaĝadoj kaj restadoj de la geasocianoj kaj iliaj familianoj en eksterlando, kiel dono ĉiuspecajn informojn je privataj kaj oficaj celoj k. t. p.

g) kreskigi inter siaj anoj fortan senton de solidareco.

(26) § 15

d) Materiale kaj morale helpi la asocion kaj plenumi la statutojn.

(27) § 16. Ĉiu ano paginta la kotizon ricevas senpage:

- a) membrecon kun legitimacio,
- b) fakrevuon,
- c) oficialajn eldonojn laŭ decido de la estraro,
- ĉ) jarlibron,
- d) ĝuas la helpojn kaj servojn de la asocio laŭ statutoj.

(28) § 32. La estraro deponas ambaŭ kapitalojn en la ŝtatan bankon de la asocia sidloko, aparte cirkulantan kaj aparte rezervan kapitalon.

(29) § 41. La administranta estraro kaj revizora komitato estos balotataj de la asocia jarkunveno por tempodaŭro de 2 jaroj el anoj de unu lando.

Kontraŭ tiuj ĉi proponoj mi povas diri nenion.

Bedaŭrinde, diversaj malhelpoj ne permesis al ni la prilaktadon de tiuj ĉi statutoj tiamaniere, kiel mi tion imagis.

Kvankam estis sufiĉe da tempo, por ke almenaŭ la plimulto de niaj anoj donu siajn opiniojn, mi tamen ne kuraĝas konkludi el tio, ke tiuj niaj anoj kiuj tion ne faris, konsentas kun mia propono.

Sl. V. Stojnić, prezidanto
Beograd — Kolonija Min. Saob. 17.

ANONCETOJ

por korespondado kaj interŝanĝo.

15 vortoj kostas 0.50 Svis. frank. Ĉiuj pluaj 5 vortoj 0.20 Sv. frank. aŭ egalvaloro.

Nemembroj pagas pli 50%.

Mallongigoj por anoncetoj:

- | | | | | |
|-------|--|---------------|-------------------|--------------|
| PK = | } Mi deziras | } poŝtkartoj | | |
| LE = | | | } korespondi per | } leteroj |
| IK = | | | | |
| PM = | } Mi kolektas | } poŝtmarkojn | | |
| HM = | | | } kaj interŝanĝas | } helpmonon. |
| Rĉ = | } Mi respondos ĉiam. | | | |
| Kĉl = | } Mi interŝanĝus kun ĉiu lando. | | | |
| Kl = | } Mi interŝanĝus nur kun landon . . . | | | |
| Nd = | } Mi ne deziras nepo stulitan sedajon. | | | |

La honora devo de ĉiu anoncanto estas respondi.

S. Hdges, fervojoficisto, asesoro de IAEF, 96 Herga Road, Wealdstone, Middlesex Anglujo, deziras pasiĝi sian libertempon de 14-a ĝis 19-a de Septembro, kune kun sia edzino kaj 12 jara filino en marborda urbo de sudorienta aŭ sudokcidenta Francujo.

Li petas gekolegojn, kiuj estus pretaj akcepti lin dum tiu tempo en la loĝejon, ke ili la proponon kun indiko de la prezo sengu al li.

Someran Restadon, serĉas anoj de la »Ligo de Esperantistoj Fervojistoj en Ĉeĥoslovaka respubliko« dum 6 ĝis 24 tagoj t. c. dum ilia libertempo de post 1. Majo ĝis 30. Septembro 1925. ĉe fervojistoj-esperantistoj el tuta Eŭropo interŝanĝe aŭ rekompence. Fervojistoj precipe el ĉiuj eŭropaj ĉefurboj, kiuj deziras viziti dum libertempo la ĉefurbon, Praha kaj aliajn urbojn en Ĉeĥoslovakio ricevos ĉe niaj anoj senpagan loĝejon k. t. p., se ili konsentos doni la samon al niaj anoj. Sufiĉas ankaŭ unu lito. Precipe estas petataj fervojistoj el Parizo, Roma kaj el ĉiuj marbordaj urboj aŭ vilaĝaj stacidomoj.

Korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn, leterojn, il. kartojn poŝtmarkojn, fotografaĵojn kaj esperantajn gazetojn deziras anoj de la »Ligo de Esperantistoj Fervojistoj en Ĉeĥoslovaka respubliko« kun gekolegoj aŭ kun aliaj samideanoj el tuta mondo. Ili ĉiam respondos, Interesuloj bonvolu skribi al: Adolf Kvapil, fervoja insp., Praha XVI. Nadražni str. n-ro 31/294, Ĉeĥoslovakio.

REKOMENDATA DE LA
XVI-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO!

La eldonon de la
SOLA ARTA LITERATURA
MONATA ESPERANTA REVUO

LITERATURA MONDO

Transprenis
HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO
Budapest, VI., Eötvös-u. 3.

Ĉiu grupo kaj literaturamanto
nepre helpu la gazeton per
abono kaj disvastigo!
Po No 12.000 hung. kronoj.

KUNLABORANTOJ:
LA PLEJ KONATAJ ESPERANTAJ
VERKISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ!

VI DEVAS SUBTENI NIAN SOLAN LITERATURAN REVUON!

KOTIZOJ. Ĉiu ano paginta la kotizon ricevas la oficialan organon. — Kotizoj estas jene fiksitaj: Aŭstrio: 30.000 K; Anglujo 6 Ŝil.; Belgio 15 Fr.; Bulgario 80 Lev.; Ĉeĥoslovakujo 15 ĉk.; Danujo 7 Kr.; Estonio 200 MK; Finnlando 30; Francio 15 Fr.; Germanujo 250 OM; Hispanujo 8 P.; Hungarujo 4 OK; Italio 15 L.; Japanujo 3 J; Jugoslavio 45 D.; Latvio 3 L.; Nederlando 3 G.; Norvegujo 7 Kr.; Polujo 3 Zl.; Rumanujo 125 L.; Svedio 3 K.; Usono 1 D.; Svisujo 3 Sv. fr. — Landoj kiuj ne estas indikitaj pagu la egalvaloron de 1 Dollaro.

KIEL SENDI MONON AL NI. Eksterlandanoj kaj enlandanoj sendu la monon en rekomendita letero al: Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (kasisto Emil Slaviček) Zagreb, Jugoslavio, Jezuitska ul. 1.